



N-ro 44

1979-1 Aprilo

10-a jaro

Kluba informilo de ELF-AREK

ELF: Esperanto Ligo Filatelista

AREK: Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj



Svisa Esperanto-poŝtmarko

Nova Esperanto-tutaĵo

Sur poŝtkarto de Germana Federacia Poŝto kun nominalo de 40 fenigoj (burgo Eltz) oni trovas duonoficialan alpreson de la blazono de International Police Association kun la enskribo en Esperanto "Servo per amikeco". Tiu slogano ripetiĝas sub la blazono graslitere esperante kaj germane. En Paderborn okazis de 15.9–22.9.1978 ekspozicio de IPA kaj la poŝto uzis specialan memorigan nuligan stampon. Tiu stampo portas germanlingvan tekston kaj enhavas ankaŭ la blazonon de IPA. Tamen, la esperantlingva enskribo eĉ lupee ne estas legebla, kaj okulfrape nur imitita. Tial tiu stampo laŭ mia opinio ne estas "Esperanto-stampo" katalogenda. Sed nepre la tutaĵo trovi lokon en aperonta katalogo! Cetere min ĉiam denove mirigas la fakto, ke la IPA uzas Esperanton en sia emblemo kaj mi supozas, ke iel la fama August Weide en Hamburgo tion kulpas. Bona afero por ni! La poŝtkarton vi povas havigi al vi pere de nia stampobanko. Pura aŭ stampita: 2 IRK + sendokostoj.

Niaj novaj stampoj

Sorokaba-Brazilo

En la esperantomovade vigla Brazilo "sub la ekvatoro" aperis nova poŝta stampo pri E-temo. La Sorokaba Esperanto Klubo en kunlaboro kun la Filatela Klubo Sorocabano okazigis en la kadro de la urba kultura agado ekspozicion pri filatelo kaj Esperanto. Tiun esperantofilatelan manifestacion patronis la urba konsilantaro – sekcio kulturo de Sorocaba.

Poŝta memoriga stampo memorigas tiun eventon. La ekspozicio okazis de la 15a ĝis 18a de Decembro 1978.

Gratulojn al niaj karaj samideanoj en Sorocaba! Dankon al samideano Grattapaglia pro la sendita informo.

Budapeŝto-Hungario

La organizintoj de la 8a Vintra Esperantista Ferio (28.12.78–2.1.79) denove prizorgis poŝtan memorigan stampon en la jam konata vesto. Nia kluba amiko Radnai preparis ornamajn kovertojn.

Valletta-Malto

Kontraŭ du IRK eblas havigi al si tiun maŝinstampon. Oni tamen atentigas, ke "perfektajn stampojn" sendi ne eblas – la stampoj estas sur afrankitaj kovertoj (pm 1 c kun fiŝoj kaj fiŝistaj boatoj). Je dispono estas c. 60 ekz. Turnu vin al la adreso: "LA ESPERO", New Street off Qormi Road, St. Venera, MALTA.

Leipzig–GDR

50 jarojn post la stampo pri la 9a SAT-Kongreso en Leipzig en tiu ĉi urbo denove aperis poŝta stampilo okaze de la IFER 79. Temas pri Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo. La stampon prizorgis samideano Jürgen Hamann, kiu ankaŭ estas la organizanto ĉefa de IFER. Tiu IFER naskiĝis 1978 kaj oni intencas okazigi ĝin ĉiujare okaze de la Printempa Foiro de Leipzig.

Anoncoj

Poŝtan Esperantostampon de IFER 79 sendas la Organiza Komitato de IFER kontraŭ 2 validaj IRK pere de samideano J. Hamann, DDR-705 Leipzig, Püchauer Str. 3.

ELF-AREK-Kabano en Budamontoj!

Nia klubo nun havas propran ferio-kabanon en la Budamontoj de Budapeŝto! Niaj karaj geklubanoj, kiuj post la 1-a de junio 1979 intencas viziti la hungaran ĉefurbon trovos agrablajn tranoktejon en ĉarma kabano meze inter persikaj arboj, vinberujoj kaj verdaj herbejoj. Silento, pura aero kaj grandioza panoramo de la ĉefurbon vin tie atendas. Aŭtobuso post 10 minutoj atingas la centron de la hungara metropolo kun la majesta Dunabo.

La bela kaj komforta kabano estas malferma *nur* por *Esperantistoj!* Interesuloj sin turnu frutempe al nia kara klubano

Radnai, Vilmos
H-2331 Dunaharaszti
P.O. Box 40 – Hungario

Do, karaj geamikoj, ek al Budapeŝto! Mi persone jam antaŭ 2 jaroj ekzamenis la aferon kaj trovis ĝin tre utila (kaj fruktodona – kun kernoj kaj en flua stato).

– Redaktoro –

Novaj glumarkoj

1972	Hispanio	AVA Vendrell
1973	Hispanio	AVA Vendrell
1974	Hungario	Ĝojan Kristnaskon . . .
1975	Hungario	Ĝojan Kristnaskon . . .
	Lunel	Congres regional
	Orleans	La heredo
	Saint-Junien	30a kgr de SAT-Amikaro
1976	Riga	Neĝfloketo
1977	Budapeŝto	Internacia foiro
	Kampobaso	48a kgr
	Luĉenev	Oktobero-Revolution
	Riga	Neĝfloketo
	Hungario	90 jaroj de Esperanto
	Zsombo	9a pac-renkonto
1978	Havano	Festivalo de Mondjunularo
	C. Ferrand	Kanzona konkurso
	C. Ferrand	Nacia kongreso
	C. Ferrand	G. exposition
	Lectoure	51a SAT-kongreso
	Rennes	33a kgr de SAT-Amikaro
	UdSSR	Novjar-festo
	Klajpeda	10a jubileo (4 div)
	Feldberg	Fiŝhokista tendaro
	Sete	Congres regional
	Tarnovo	34a TEJO-kongreso
	Gorizia	12a ILEI-konferenco
	Varna	10a IPTEA-kunveno
	Varna	UMEA-jubileo
1979	Leipzig	Foira E-Renkonto IFER 79
	Luzern	64a U.K.

Konsultu ankaŭ niajn informilojn 1977/2 kaj 1978/1.

Kiu povas doni informojn pri "Fondiĝ-jubileo T.A.K. 1932–1937 Nagymaros"? Mi trovis verdan folion (145x210) kun 12 diversaj desegnaĵoj.

Kiu povas sendi al mi la glumarkojn: Havano/Festivalo, E-himno sur kofro-etikedo k 20a aŭstralia E-kgr?

Glumark-fakulo: Gaston Tremon, 31 starto Turgot, 87350 Panazol.

Belgaj novaĵoj

Samideano Franz Luyten akiris nian katalogon kaj sciigas: Mankas en ĝi la stampo "bruselo-nordkabo", uzita 1975 okaze de bicikla vojaĝo al la nordo. Li sendis fotokopion, kiun post riparo ni publikigos.

Pri Liege kaj Verviers li informis, ke temas pri du divers-grandaj maŝinstampoj. Pri la Borgerhout-a stampo li klarigis, ke la teksto en ĝi signifas "Jubilea Pm-ekspozicio" de la kluboj filatelaj Pro Thema kaj De Tassis. En la stampa desegnaĵo troviĝas la vorto ESPERANTO.

Franz Luyten membras en tiu filatela klubo kaj montris sian e-filatelan ekspozajon.

Ni tre ĝojus, se nia filatela amiko plifortigus niajn vicojn en nia ELF-AREK.

Liaj sciigoj iomete malordigis la numerojn en nia stampokatalogo. Mi proponas, ŝanĝi numerojn nur pere de la 2a suplemento fine de tiu ĉi jaro por eviti konfuzon.

Stampo "bruselo-nordkabo"

Oni uzis du diversajn stampilojn kaj ambaŭ la 4.7.1975:

- 1) Bruxelles 1000 Brussel
- 2) Brussel 1000 Bruxelles

La stampon desegnis sinjorino R. Vanderstockt-Beeckman, kiu estas la aŭtoro de jam pluraj belgaj memorigaj stampoj.

La stampon mendis Benelux Poolpost Vereniging.

Daŭro de la uzado: 1 tago: 4.7.1975 (unu el la plej maloftaj memorigaj stampoj 1975 en Belgio).

La en Bruselo stampitaj kovertoj bicikle vojaĝis al Norda Kabo, tie la poŝto denove stampis la kovertojn kaj resendis ilin.

Ni disponas pri ankoraŭ 100 kovertoj kaj estas pretaj interŝanĝi ilin: 1 koverto = 20 neuzitaj kaj validaj poŝtkartoj kun enpresita afranko por eksterlando (tutaĵoj). Tiujn ni ĉiam povas uzi por nia stampoklubo.

ETS. S.V. VASAFIL
Burgstraat 133
B-9000 GENT (Belgio)

Redaktoro noto: Tiu firmao ne korespondas en Esperanto. Por viaj eventualaj mendoj uzu germanlingvan tekston: SENDEN SIE BITTE "BRUSELO-NORDKAPO" 4.7.1975

Unua E-stampo en Malta

Samideano John Vella Bondin afable sendis al ni informojn pri tiu maŝinstampo. La teksto WIRJA TE L ESPERANTO signifas "Ekspozicio de Esperanto".

La maŝinstampo funkciis de la 18a – 20a de majo 1978 en Valletta kaj malfermis la unuan E-semajnon en Malta, kiu okazis 22–27.5.1977. La stampan desegnaĵon faris s-ro Joe Bugeja. Gratulon al MEA pro ĝia unua nacia e-filatelaĵo!

★ ★

Vilag es Nyelv

La tuta titola paĝo de unu numero de tiu hungarlingva gazeto estis multkolora ornamita per abundo da E-glumarkoj. En la sama numero estis intervjuo pri kolektado de esperantaĵoj de nia amiko Radnai, kiu ankau preparis tiun titolan paĝon. Gratulon al li!

Stampo 12a ILEI-Konferenco

Samideano rag. Leone Furlan skribis al ni, ke okaze de la 12a ILEI-Konferenco en Gorizia/Italio (de la 19a ĝis la 27a de aŭgusto 1978) la poŝtofiĉejo en la kunvenejo uzis specialan poŝtan stampilon la 20an de aŭgusto, kaj en la urba poŝtejo la sekvajn 15 tagojn. Gorizia E-Asocio, Borgo Castello, I-34170 Gorizia disvendas ilin kontraŭ po 2 IRK.


Intersuplemento

Pro subita apero de ĉiam novaj detaloj pri belgaj stampoj momente mi estas kiel muso antaŭ la serpento. Provizore mi decidis, ne doni katalogajn numerojn al tiuj novaj pozicioj ĝis aperigo de nova katalogo por ne konfuzigi katalog-pose-dantojn. Fakte tiu bruselo-nordkabo-stampo malordigis nian vicon, ĉar ĝi devus ricevi la numeron 15-1 Bruxelles, 15-2 Brussel, Liege devus akiri numeron 16 kaj Verviers 17 (ja estas du malsamaj eĉ lau mezuro!) kaj Borgerhout fine ricevus 18. Komprenoble oni povas atendi, ke niaj membroj daŭre korektas kaj kompletigas siajn katalogojn kaj sekvas konsilojn el la faka informilo. Sed ja ankaŭ nemembroj akiris ĝin. Kion fari? Mi demandas vin! Iu diris, ke tiuj, kiuj deziras esti aktuale informataj, fariĝu membroj en nia klubo. Certe prava argumento. Tamen mi atendas viajn opiniojn! Mi do nun notas por vi la novajn eksciojn kaj petas vin fari pri ili notojn en vian katalogon.

BE	.. -1	Bruxelles	1975	4.7 "	bruselo-nordkapo 37	37
	.. -2	Brussel	1975	4.7	la sama	37
		Liege	1976	vidu	1978/4	ms 42x20
		Verviers	1976	vidu	1978/4 (1a aldonaĵo)	ms 35x22
		Borgerhout	1978	7.4	ESPERANTO (pm-ekspo)	38
BRA	28	Marilia SP	1978	17-22.7	1-a latinamerika E-kgr	31
	29	Sorocaba	1978	15-18.12	Filatela-Esperanta ekspo	31
BU	8	vidu	1-a	aldonaĵon en	1978/4	35
	9	"				ovala 36x30
	10	"				vi ni 35
IT	27	Montagnana	1978	kiel en	1978/4	
	28	Roma	1978	"		
	29	Gorizia	1978	20.8-4.9	12-a ILEI-konferenco	39
	30	Cesena	1978	kiel en	1978/4	
JU	24	Prilep	1976	29.7	kiel ne 1978/4	
	25	Ohrid	1977	kiel en	1978/4	
MALTA	1	Valletta	1978	18-20.5	ESPERANTO-ekspozicio	ms 49x27
P	1	Coimbra	1978	kiel en	1978/4	24x24
L	2	Luxembourg	1978	1-7.9 (?)		ms ?
HU	65	Budapest	1978	28.12-2.1 (?)		33
GDR	3	Leipzig 1	1979	9-14.3	Foira E-renkonto	



Leipzig



INTERNACIA


FOIRA

ESPERANTISTA

RENKONTIĜO



domsplanco



Interesa oferto de filatelejo

La filatela entrepreno Alfred Neußner en Okcidenta Berlino laste sendis al ni tre interesan ofertoliston pri E-pm kaj E-stampoj. Sinjoro Neußner estas kaj Esperantisto kaj Idisto. Eble iom pli Idisto, sed tamen li ankaŭ perfekte regas Esperanton. La de li proponitaj prezoj respondas verŝajne al la aktuala merkata situacio. Tio koncernas kaj la pm kaj la stampojn. Menciendas la iom honteme prezentita oferto:

Anglio: poŝtstrikio 1971, privat-pm de POST HASTE, markoj kun teksto en L.I.

Klarigendas, ke L.I. ne havas signifon de Lingvon Internacia en la originala senco, sed Lingvo Ido. Plie ni atentigas, ke tiu ĉi serio "L.I." ne havas signifon de Lingvo Internacia en la originala senco, sed: Lingvo Ido.

Plie ni atentigas, ke tiu ĉi serio el nia vidpunkto ne havas filatelan karakteron, sed ke ni klasifikas ilin IDO-glumarkoj. Ni tute ne volas kontraŭpropagandi tiun serion, sed nur atentigi, ke ili ne trovi lokon en filatela ekspoziaĵo en konkura klaso, ĉar ili havas nenion komunan nek kun filatelo nek kun Esperanto. Se filatele oni volas dokumenti IDOn, tiam certe nepre taŭgus iu poŝte vojaĝinta koverto kun IDO-glumarko au IDO-sendinto-stampo sur la pm-flanko.

La proponitaj prezoj estas akcepteblaj krom de du pozicioj: La ms de Nürnberg 1923: 70.– gmk, de München 1948: 15.– gmk. Tio ŝajnas al mi persone iom tro.

Interesa la oferto de Nederlando, memoriga folio presita de UEA por la olimpado 1928 kun pm serio Michel 205–212 kun memorigaj stampoj (ili ne estas E-stampoj!). Neußner postulas 250.– gmk. Mi persone ankau posedas tiun folion kaj volas forvendi ĝin.

Elstaraj la pozicioj de Jugoslavio: 665.– gmk por neuzita serio kaj Triesto 300 Din uzita: 150.–, sendenta 40 j Esperanto SU kostas neuzita 175.–. Ĉiuj aliaj prezoj estas pageblaj. La stampoj kostas po ĉirkaŭ 0.75–1.50 fed. gmk.

Sinjoro Neußner pretas ankaŭ aĉeti stampojn kaj petas pri ofertoj kun prezoj. Jen la adreso: Alfred Neußner, Dominicusstr. 25, D-1000 Berlin 62

Esperanto-perfino sur poŝtmarko!

Kiel rajtigita Ĉe-metoda instruisto mi gvidis antaŭmilite E-kursojn en nederlanda provinco Frislando. La organizinto de la kursaro estis la tre konata frisa s-ano Sibe de Jong Dzn. en Huizum – Leeuwarden, la fondinto de la Frisa-Esperanto-Instituto. De li mi ricevis nederlandan pm de valoro 1 guldeno (ZU 63, serio "Reĝino Wilhelmina") kun la perfino GUSTO. Li konsideris ĝin esp. vorto kaj kiel esperantajn konservis. La donacitan pm mi enmetis koverton kaj tute ĝin forgesis. Sed okaze de mia pasintjara revizito en Nederlando mi hazarde trovis la koverton inter miaj tie deponitaj posedaĵoj kaj surprizita konstatis, ke la pm estas verŝajne valora filatela materialo ĝis nun neregistrita kaj nekonata al kolektantoj.

La trovita perfino GUSTO estas eble legi sur la dorsflanko kaj laŭ mia amiko estis uzata antaŭ dudekaj jaroj de iu granda renoma nederlanda firmao en Hago aŭ Amsterdamo.

La firmao, influita per grandskala propagando de Esperanto, sukcese farita per gazetartikoloj kaj broŝuroj de la pioniro Dreves Uitterdijk, akceptis tiun E-vorton kiel perfinon sur poŝtmarkoj, por tiel atentigi la publikon pri sia firmao kaj samtempe por malebligi al sia personaro uzi ilin por privata korespondado.

Restas la dilemo: ĉu la vorto GUSTO estis traduko de la nomo de iu promoda magazeno aŭ havis alian signifon? Tion mi ne rememoras kaj ne scias.

Laŭ PIV la vorto "gusto" signifas manieron, stilon de artverko. Do povas esti, ke la firmao komercis per objektoj, kiuj estis majstraĵoj de bongusto.

Nun estas necese esplori devenon de tiu ĉi perfino, konстати la nomon de la firmao, identigi urbon kaj tempon, kiam ĝi estis uzata. Tion povas fari niaj amikoj en Nederlando.

Kolekti perfinojn estas aktuala modo en la filatela mondo. Ekspozi ilin en temaj kolektoj signifas gajni de la ĵurioj pli da poentoj!

FABA

PERFINO = filatela trapikaĵo en poŝtmarko fare de firmaoj kaj de aliaj institucioj.



Vatikano kun Esperanto-pm!

Nia Amouroux pere de siaj "lupeaj okuloj" trovis sur pm de Vatikano enskribon en esperanta ortografio "al-leluĵa" kaj pri tio skribas al ni:

Antaŭ nelonge mi relegis la valoran artikolon de A. De Salvo pri "Pastro Lorenzo Perosi" (Fenikso nro 26 p. 11-12) kaj nur tiam rimarkis, ke eraro en la priskribo de la 180-lira pm pri Lorenzo Perosi ĝis nun kaŝis al ni tiun Esperanto-poŝtmarkon! D-ro de Salvo diris, ke "tiu vatikana pm montras surfone muziknotojn kaj aŭtografon". Nu, muziknotoj estas sur la pm, sed anstataŭ aŭtografon sub la muziknotoj troviĝas mane skribita de Lorenzo Perosi enskribo "al-leluĵa", kaj, kio por ni plej gravas, estas, ke laŭ sia kutimo Perosi uzis literon el la Esperanto alfabeto, nome la supersignitan ĵ. Tiu grava fakto ilustrita per la diroj de la tuta artikolo ebligas al ni konsideri tiun pm kiel nepre envicigeblan en niajn kolektojn. Halleluja!

Amoureux – aj rimarkoj

AU 5 – Graz 1949 – en 2 tipoj

La diferenco kuŝas en la datprezento:

1a tipo: ciferoj pli larĝaj kaj, ĉefe, 4 supre fermita

Mi posedas la jenajn: verda – 19 kaj 20.7

nigra – 18.7.49

viola – 20.7.49

2a tipo: ciferoj malpli larĝaj kaj, ĉefe, 4 nerfermita supre

Mi posedas la jenajn: verde 16.7.49

viola 16.7.49

DA 8 – mi ĝin havas kun la dato-eraro 29.17.75

LU 2 – estis uzata en Luxembourg 1 dum la unua Septembra semajno. Mi ĝin havas kun la datoj 1, 3, 5, 7.IX.78.

Mi tre dubas, ke la surpriso sur la bulgara pk "Esperanto estas de poŝta origino. Tute similan ilustraĵon mi havas sur karto eldonita de Bulgara E-Kooperativo jam en 1958."

* * *

Svisa Esperanto-poŝtmarko

Teksto: 64a Universala Kongreso de Esperanto Luzern 1979

Bildo: Varmaera balono ESPERANTO

Valoro: 70 rp

Koloro: 4-kolora: malhelverda, flava, griza, nigra

Mezuro: 36:26 mm, bildo: 33:23 mm

Grafiko: Kurt Wirth, Bern

Presejo: Helio Courvoisier en la Chaux-de Fonds

Vendado: 21–29.2.1979

En "Berner Briefmarken-Zeitung" 1/79 legeblas notoj pri tiu nova poŝtmarko. Nature ni ESPERANTO-filatelistoj tre ĝojas pro la aperigo de tiu ĉi nova poŝtmarko kaj ni elkore gratulas al la organizantoj de la 64-a, kiuj sukcesis konvinki svisan poŝtan ministerion pri eldono de tiu pm.

Varmaera balono Esperanto sur pm!

Kio nin speciale ĝojigas koncerne la novan E-pm, estas, ke la grafikisto bonvolis preni la motivon de la E-balono. Sendube nun la klopodoj de la Zürich-a E-klubo kaj de s-ano Liechti koncerne la balonon alportos fruktodonan rezulton. Ili ja sia-tempe organizis memorigajn kovertojn okaze de la 1-a flugo pri kiu ni skribis en nia informilo 1977/2. Pere de nia stampo-banko eblis aĉeti tiun memorigan koverton.

Eblas nun, aranĝi kun la nova E-pm kaj tiu koverto tre efikan ekspozician folion. Do, denove tiu koverto estas en la centro de la intereso de filatelistoj.

Demando: ĉu okazis intertempe pliaj flugoj de tiu balono kaj ĉu ekzistas pri tiuj flugoj iuj memorigaj kovertoj? Mi povus ankaŭ imagi, ke okaze de la UK en Luzern okazos speciala balonpoŝta flugo de nia ESPERANTO-balono.

Redaktoro

Bonvenon al niaj novaj membroj:

Joseph Shoham, 20 Fraserwood Ave. Apt. 5
CDN-M6B 2N4, Toronto, Kanado

William McCullam, 4 Hornshill Farm Rd. Stepps
GB-G 33 6 DE Glasgow, Skotlando
(Li kolektas nur E-pm)

Gunnar Börjesson, Marklandsgatan 65 VII
S-414 77 Göteborg
(kolektas nur E-pm)

Ole Börresen, Snorreveien 4
N-3200 Sandefjord, Norvegujo

Rudolf Müller, Gottfried-Keller-Str. 82
DDR-8029 Dresden

Daniel Omar Martinez V, Calle 62 entre 10.y.B 19.
BARQUISIMETO/Edo Jara, Venezuelo

Paul Berkhout
, Lindelaan 18
NL-1561 CL Krommenie

R.J-M. Moraud, 123 rue de Royan
F-16000 Angoulême

Kuriyama Hitosi, Kuriyama Kobata 288-2
661 Amagasaki Japanio

Ni atentigas niajn novajn membrojn, ke ili rajtas senpage utiligi la paĝojn de nia kluba informilo por anoncoj. Ili bonvolu skribi al la redaktoro.

Por 1979 pagis kotizon:

55 membroj.

Nova adreso:

Dr. Rosetel Prodanescu, C.P. 61-89

R-75500 Bucuresti 61, Rumanio

Li hobias inter alie kolektadon de Esperanto-poŝtmarkoj, -poŝtaj stampoj, -UTK (FDC),
-tutaĵoj, -insignoj, -glumarkoj.



Prezidanto de la ELF-AREK-Klubo:

Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3

Al li sendu la kotizon de 15 IRK aŭ 25.– sv.kr. poŝtkonto 51 57 85.

I. Paulsson, Solna.

Senvvaloraj estas IRK stampitaj antaŭ 1.1.76

Redaktoro de la kluba informilo:

Rudolf Burmeister, W. Firl. Str. 30, DDR-9047 Karl-Marx-Stadt, 95-99

Stampobanko:

Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4, poŝtkonto: Han. 1650 42-308.

